# *Plenkunsido de la komunista partio analizas la kuban konstitucion*




Havano, 14 dec (RHK) Prezidita de la unua sekretario de la komunista partio, la generalo de armeo Raúl Castro, sesiis la 8-a plenkunsido de tiu organiza?o, dum du laborsesioj dedi?itaj al analizo de la projekto de konstitucio de la respubliko, rezultinta el popola konsulti?o. ?i estos prezentita al la deputitoj en la venonta sesio de la nacia asembleo de la popola povo, kiam oni raportos detale al la popolo.

La plenkunsido agnoskis la grandan laboron faritan por kolekti la opiniojn de la civitanaro kaj gratulis ?iujn partoprenintojn en la organizado kaj subteno al la procezo, interalie, la duopoj kiuj gvidis pli ol 133 mil asembleojn efektivi?intajn tra la tuta lando; anka? tiujn kiuj kompilis kaj analizis la opiniojn, kaj aparte la komisionon respondecan de la asembleo por redakti la konstitucian projekton.

Nombro kiu superis la kvanton de ok milionoj da civitanoj ?eestis la kunsidojn kie oni esprimis pli ol unu miliono 700 mil opiniojn. Oni precizigis ke ?iuj opinioj estis analizitaj detale kaj havis signifan taksadon en la ellaborado de la nova dokumento.

La plenkunsidon anka? partoprenis invitite la membroj de la ?tata kaj ministra konsilantaroj.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/178863-plenkunsido-de-la-komunista-partio-analizas-la-kuban-konstitucion

**Radio Habana Cuba**